

Sanskrito – hindeŭropa lingvo (3)

Kiuj estas la plej antikvaj tekstoj en la mondo?

(En la sekva listo la datoj estas proksimumaj.)

La plej antikvaj latinaj tekstoj datiĝas de 450 a.K.;

la grekaj epopeoj de Homero datiĝas - de 800 a.K.;

la plej antikva ĉina literaturo – 1100 a.K.;

la plej antikvaj partoj (aŭ libroj) de la hebrea Biblio – de 1200 a.K.;

la mezopotamia kodekso de Hamurabi (en kojnoskribo) – de 1800 a.K.;

la sumera eposo Gilgameŝ (ankaŭ skribita per kojnoskribo sur argilaj tabeloj) – de 2100 a.K.;

la plej antikvaj egiptaj tekstoj (skribitaj per hieroglifoj) – de 2300 a.K.;

la Vedo: laŭ la reganta teorio ili estis ellaboritaj (en la veda sanskrito aŭ veda lingvo) ĉirkaŭ 1.500 jaroj a.K., sed laŭ diversaj hindaj kaj nehindaj sciencistoj ili datiĝas de 4500 a.K.

Estu kiel ajn, unuflanke ekzistas vedaj manuskriptoj nur el la 11-a jarcento p.K. (ĉar dum longaj tempoj la Vedo estis transdonitaj buŝe kaj ĉar la unuaj manuskriptoj ne estis konservitaj), sed aliflanke sanskrito estas – inter la lingvoj kun skribitaj tekstoj – la plej antikva lingvo ankoraŭ uzata.

La latina kaj greka ankoraŭ estas lernataj cele al la legado de antikvaj tekstoj kaj ili estas parte uzataj en religiaj ceremonioj; la sama validas por la hebrea; krome tiu estas – denove – parolata de la israelanoj. Sed la tri estas malpli antikvaj ol sanskrito.

Sanskrito estas uzata ankoraŭ hodiaŭ buŝe por transdoni religiajn tekstojn kaj ripeti mantrojn, tamen ĝi estas ankaŭ skribita. Ekzistas diversaj litertipoj, sed la plej uzata estas la sistemo devanagaro; unu ekzemplo: भगवद्गीता (tio signifas “Bhagavad Gita”).

Oni uzas devanagaron ne nur por sanskrito, sed ankaŭ por pluraj modernaj lingvoj en Barato (Hindio, Hindujo).

Kial skribi (kaj paroli) nuntempe en la antikva lingvo sanskrito?

Ekzistas en Barato movado por la revigligo de sanskrito. Jam ekde 1970 estas eldonata ĉiutaga ĵurnalo en sanskrito (“Sudharma”) kaj en 2010 aperis alia sanskrita ĵurnalo (“Sanskrit-Vartaman-Patram”), kiu krome estas enretigata. En la Vikipedio estas dirite: “Ekde la jaroj 90 kreskis la streboj por revigligi la buŝan sanskriton. Multaj organizaĵoj – ekzemple ‘Samskrta Bharati’ – aranĝas konferencojn en buŝa sanskrito por popularigi la lingvon. La Centra Departamento de Mezgrada Eduko de Barato igis sanskriton tria – fakultativa – lingvo.”

Ankaŭ estas radiostacio ("All India Radio"), kiu elsendas ĉiutage sanskrite du programojn – po 5 minutoj – kun gravaj novaĵoj.

Laŭ diversaj popolnombradoj 190.000 baratanoj parolis sanskriton kiel duan lingvon en 1961. En 1991 ĉirkaŭ 50.000 baratanoj parolis ĝin flue. En 2001 ĉirkaŭ 15.000 infanoj havis ĝin kiel denaska lingvo.

Nuntempe en pluraj landoj – ekzemple en Brazilo – estas ofertataj kursoj de sanskrito kaj estas publikigataj lernlibroj kaj gramatikoj, ĉefe ene de organizaĵoj aŭ kursoj de jogo.

Tamen sanskrito estas tre kompleksa, malfacila lingvo, inter la hindeŭropaj lingvoj la kontraŭo de Esperanto. En Esperanto estas du gramatikaj kazoj: nominativo kaj akuzativo; en sanskrito estas **ok** !!! Krome estas tri nombroj (singularo, dualo, pluralo), tri genroj (vira, ina, neŭtra) kaj – en la verba sistemo – tri voĉoj (aktiva, meza, pasiva) !

Kiel mi diris en antaŭa artikolo, en Barato ekzistas 23 oficialaj lingvoj; unu el ili estas la angla. La aliaj estas "naciaj oficialaj lingvoj", kaj unu el tiuj estas sanskrito!!!